

EKO 2021

Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok
jaroj, de post 2013

2020: rekorda jaro:
kun 60 komunikoj

Subtene al la loka,
landa, faka kaj
regiona agado

EKO 2021-22 sendita el Budapeŝto la 7an de junio

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkröĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Nova konkurso por Unesko kaj Wikipedia kresko

UEA kaj ELiSo/VMEO malfermas la vikimedian projekton 'Unesko 2021' omaĝe al la 75-jariĝo de Unesko. Ĝi estas reta redakta maratono, kiu okazas ankaŭ kadre de la kampanjo 300 000, simile la la Afrika Monato, kiun ankaŭ UEA apogis en majo. La nuna junia konkurso celas plimulti la enhavon en Esperanto pri Unesko kaj tiel disvastigi ĝiajn valorojn kaj idealojn. Ĝia formo estas reta artikol-redakta konkurso. Partoprenantoj zorge konsultu la regulojn. Poste kreu aŭ plibonigu artikolojn rilatajn al Unesko kaj aldonu ilin al la listo. La verkado estas ĉefe por helpi al Vikipedio en Esperanto, al libera edukado, al Esperanto, kaj precipe al disvastigo de valoroj kaj idealoj de Unesko. Tamen premioj estas! Al palpeblaj premioj apartenas specialaj insignoj al via uzanto-paĝo kaj jenaj premioj:

- 1-a premio: donackarto valora 60 € + Unesko-libro + Unesko-Kuriero
- 2-a premio: donackarto valora 35 € + Unesko-libro + Unesko-Kuriero
- 3-a premio: donackarto valora 10 € + Unesko-libro + Unesko-Kuriero
- 4-a premio: Unesko-libro
- 5-a premio: Unesko-Kuriero

Limdato: junio 30a! UEA kaj ELiSo deziras al ĉiuj partoprenantoj sukceson!

Rigardu ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Projekto:Unesko_2021

Fernando Maia Jr., **Universala Esperanto-Asocio** | Vicprezidanto

Servo subtenata de
**Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj**



Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean



ENHAVO

- Unesko- Vikipedio
- ILEI virtuale
- Ondoj ondas
- Afiŝoj 20-lingve
- TEJO volontule
- Eŭropa konsultado



ILEI anoncas

Pri la 54-a ILEI-Kongreso en 2021

2021-06-03

Ni devas rezigni pri la surloka fizika kunveno en Benino. La anoncoj pri aliĝoj estis tre malmultaj pro la daŭraj limigoj kaj obstakloj en vojaĝado. Tamen la pandemia situacio en Benino daŭre estas tute kontentiga kaj sekura. ILEI lanĉas Virtualan Kongreson. VEKI estas la 'Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI'. Jam okazas la dua tia virtuala kongreso.

54-a - ILEI Kongreso VEKI 2: 7 – 14 aŭgusto 2021

Okaze de tiu evento Benino restos en nia fokuso, ĉefe en la Nacia Vespero.

La kongresa temo estas kaj restas : **“Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj”**

La komitatkunsidoj okazos dimanĉe 8-an kaj marde 10-an de aŭgusto.

Dutaga simpozio okazos ĵaŭde 12-an kaj vendrede 13-an de aŭgusto.

La temposkemo en tri sesioj en ĉiu tago restos la sama kiel en 2020 en VEKI 1.

La teknika organizado estas en la manoj de Unika (azia estrarano de ILEI).

La programa starigo estas en la manoj de Marija Belosevic(Kroatio) kaj Mireille Grosjean.

La simpozia koncepto estas en la manoj de Ivan Colling kaj Radojica Petrović.

La aliĝilo estas en preparo.

La Kongreskotizoj estos : por A-landanoj 20 EUR. Por B-landanoj 10 EUR. Por subvenciataj personoj (ni alvokas al A- kaj B-landanoj, ke ili subvenciu unu aŭ plurajn personojn, kiuj ne povas facile transpigi ian sumon al Eŭropo.) 5 EUR. La pagoj povos okazi per ĝirado el UEA-konto de partoprenonto al UEA-konto de ILEI aŭ per ĝirado per kreditkarto al indikota banko en Belgio.

Por demandoj kaj proponoj pri pagado kaj subvencio turnu vin al Mireille Grosjean:

mirejo.mireille@gmail.com.

Por proponoj pri la programo turnu vin al Marija Belošević miriam010@gmail.com kaj Mireille Grosjean.

Por demandoj pri la simpozio turnu vin al Petrović Radojica <radojica.petrovic.rs@gmail.com> kaj Ivan Colling <iecolling@yahoo.com.br>.

Por demandoj pri la teknika aspekto de VEKI 2 turnu vin al Unika unika@esperantujo.io

Ni forte esperas, ke tiu 54-a Kongreso estos fruktodona, lertiga, interesa kaj distra.

Se vi deziras partopreni kaj sekvi la prelegojn, aŭskulti la koncertojn, partopreni en debatoj, skribu al mi, mi provos organizi tion.

Nome de la Estraro : Mireille Grosjean, prezidanto.

Juna amiko

**Valora servo de ILEI.: lego-materialo
por progresantoj! Nekomplika lingvaĵo,
bele ilustrita, presita aŭ rete abonebla!**



500 tagoj da persisto ĉe la Ondo

Ekde la 1a de januaro 2020 en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto en/pri Esperanto. La 14an de majo 2021 ĉi tiu ĉiutaga informserio atingis la 500an tagon. Legu la liston de la plej popularaj tekstoj kaj, se vi povas, subtenu la projekton per abono, donaco aŭ diskonigo <https://sezonoj.ru/2021/05/ondo-81/>

Ionel atingas jubilean aĝon

Okaze de la hodiaŭa 65-jariĝo de Ionel Oneț ni proponas legi intervjuon kun li, ĵus aperintan en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* kun la titolo “Entuziasmo kaj bonvolemo ne sufiĉas”. La jubileulon, kiu dum dudeko da jaroj prizorgas la libroservon de UEA, intervjuis Paweł Fischer-Kotowski. <https://sezonoj.ru/2021/05/ionelonet/>

Jubilea memorigo –io por via klubo aŭ asocio!

Aleksander Korĵenkov ĉiumonate pretigas kaj publikigas liston de plej gravaj Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por la kuranta monato. La junia listo estas konsultebla en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto”: <https://sezonoj.ru/2021/06/junio-8/>

Afiŝoj progresegas – nur uzu ilin utile!

La afiŝoj montritaj en EKO 21 estas jam nun videblaj kaj elŝuteblaj en dudeko da lingvoj:

<https://i.getspace.eu/cloud/index.php/s/MPETo3GExBZNgyF?path=%2FEO-TAGO-2021-afishoj>

Tie vi povas trovi ĉiujn faritajn afiŝojn en kelkaj formatoj. La disponeblaj afiŝoj estas en la Albana, Bemba, Bulgara, Ĉina, Dana, Farsia (bildigita), Germana, Greka, Hispana, Franca, Gaela, Kroata, Hungara, Itala, Nederlanda, Rusa, Svahila kaj Turka .

Ili prezentas la Esperanto-Tagon en la 26a de julio (la dato en la apuda afiŝo estas laŭ alia kalendaro!), do restas tempo eluzi ilin: en retaj komunikoj, viaj revuoj, en gazetaraj komunikoj al la ekstero, kaj surmure en elprintita formo. Ni uzu la tagon por vidigi nin!



Ĉina festado kaj poezio

Por la 134-a datreveno de Esperanto kaj la 1-a datreveno de sia fondiĝo Liaoning-a Esperanto-Kultura Klubo (LEKK) solene okazigos La 2-an Liaoning Recitadon de Esperantaj Poemoj en la 25-a de julio, 2021, en Shenyang, ĉefurbo de la provinco Liaoning, Ĉinio. Se vi volas partopreni, ni varme bonvenigas vin kaj atendas viajn verkojn kaj videojn (malpli ol 4 minutoj) ĝis la **25-a de junio, 2021**.

- 1 Ni aranĝos iujn esperantistojn voĉlegi la verkojn elektitajn.
- 2 Vi alŝutas vian videon al iu retejo aŭ alia reta servo se vi nemalfacile retsendas. Ni surloke elsendos tiujn videojn aljuĝitaj, kun bone aŭdebla voĉo.vizaĝo.
- 3 Estas necese donitaj nomo kaj nacieco de la aŭtoroj kaj legantoj.

Se vi volas esprimi gratulojn aŭ bondezirojn al la recitado, ni atendas tiajn mesaĝojn ĝis **la 10-a de julio, 2021**. Ni aranĝos iujn esperantistojn voĉlegi viajn gratulojn. Estas necese donitaj viaj nomo kaj nacieco. Antaŭdankon pro via helpo kaj partopreno .

Wu Guojiang, Prezidanto de LEKK

TEJO kaj centroj eluzas Eŭropajn eblojn!

En la 4a de julio okazis prezento kaj kunsido de TEJO, kadre de la Erasmus projekto, **Volontulado kaj asocia daŭripov-evoluo**, kiu kunigas plurajn Esperanto-organizaĵojn :

- Esperanto-Kultur-Centro (Tuluzo - Francio)
- Kosmo Strategio (Britio)
- Bunta Esperanto-asocio (Italio)
- BES (Pollando)
- ICH (Herzberg - Germanio)
- TEJO (Nederlando).



Marion Quenut el Tuluzo detale prezentis du volontulad-programojn: **Civita Servo** (Francio) kaj **Eŭropaj Solidaraj Korpusoj** (Eŭropunia). Ĉiu programo havas siajn apartajn regulojn, sed ambaŭ portas grandajn oportunojn al Esperanto-movado, kaj povas interesi organizaĵojn aŭ aktivulojn el la tuta mondo. **SMG: La prezento montris la valoron entiri volontulojn, doni rapidan Eo-kurson, kaj iam en la volontulado akiri eksterlandan sperton en partnera Eo-centro.** Por pli da informoj: <https://www.tejo.org/agadoj/talento/volontulado/>.

Apogu Esperanton en la Eŭropa Unio

La Eŭropa Unio (EU) komencis „Konferencon pri la estonteco de Eŭropo“, kiu celas ellabori gvidliniojn por plia evoluo. Kiel elemento de tiu Konferenco okazas konsultado de la eŭropuniaj civitanoj: ili estas invitatitaj proponi kaj diskuti ideojn, kiamaniere EU evoluu. La Eŭropa Komisiono starigis platformon por tiu civitana debato: <https://futureu.europa.eu/> (*havebla en ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU, elektu vian lingvon je aliro*). Kelkaj proponoj jam aŭtorebligas rilatas al la lingva reĝimo de EU (komuna lingvo, lingva egalrajteco ktp.). Kelkaj el ili pledas por la uzo de Esperanto, aliaj proponas ekzemple la anglan kiel komunan lingvon de EU. **Apogu la sekvajn proponojn:**

- Esperanto, komuna kaj neŭtrala lingvo, facile lernebla: nova ilo por pli unuigita EU <https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399>
- Enkonduko de Esperanto en la lernejojn <https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/260>
- Agnosko de Esperanto kiel unu el la lingvoj de EU-civitanoj <https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/17955>

Vidu pli da informoj pri al aliro kaj komento en la alroĉita PDF-dokumento.

===== vortoj: 1240 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Apertaj komunikadoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de marto 2021 (per EKO 2021-12).. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspeditistoj.